

Jacques-Nicolas Goulé,

Kara Svisujo

tradukita de Paul Bennemann

Dolĉa odoro leviĝas el floroj,
milde la nokto klinas sin al la ter'.
Nun per plej brilaj lumoj kaj koloroj
Alpo-pintoj sin ornamas je l' versper'.
Kara Svisujo, mia hejmland'!
Ĉiam ankaŭ en malproksimo
vin gloras mia kant'.

Gaje promenu kun manoj interplektitaj;
dolĉe aŭdiĝu kelka frata vort'.
Kantoj eksonu! Ĉarme reĵetitaj
ili tuj revenos de la laga bord'.
Kara Svisujo, mia hejmland'!
Ĉiam ankaŭ en malproksimo
vin gloras mia kant'.

Hela la luno jam tie supreniras,
venas al ni arĝenta ĝia bril'.
Aŭdu - de l'montoj kornosonoj tiras
nin al hejmo, al ripozo en trankvil'.
Kara Svisujo, mia hejmland'!
Ĉiam ankaŭ en malproksimo.

...

*Traduko de la Franca poemo “La suisse au bord du lac” de Jacques-Nicolas Goulé en Esperanton de PAUL BENNEMANN (*1885-03.13 – †1954).*

Arg-1028-2085 (2014-06-25 17:54:00)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro “Internacia Kantaro”, eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. La teksto troviĝas ankaŭ en http://kantaro.ikso.net/kara_svisujo.